

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 46-a BRAZILO, APRILO-MAJO-JUNIO 2022 N-ro 186

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
Zamenhof. *La Espero*.

SPIRITISTOJ ESTAS CIVITANOJ KUN CIVITANAJ DEVOJ

Paulo Sergio Viana

BALDAŬ OKAZOS laŭleĝaj balotoj en Brazilo, en ĉi tiu jaro 2022. La brazila socio iom post iom estas kaptata de pasiaj, foje radikalaj sentoj, lige kun la partia politiko. Opiniojn kaj sloganojn oni ĵetas en la aeron, kaj ili flamigas mensojn; diskutoj fariĝas disputoj; atakoj anstataŭas interŝanĝon de analizoj; fanatikeco anstataŭas prudenton en la deĉifrado de kompleksaj sociaj fenomenoj; ĝentileco kaj toleremo cedas al krudemo kaj perforto. Ekstremismo ekregas, malebligante sanan dialogon. Multaj homoj emas konsideri kiel malamikojn tiujn, kiuj simple ne pensas kiel ili.

En lando ankoraŭ baraktanta en profundaj sociaj maljustaĵoj kaj malegaleco, politiko transformiĝas en bolantan kaldronon. Estas malfacile konservi la prudenton kaj ekvilibron, kiam la etoso favoras kriadon kaj ofendadon.

Kaj tamen, en tiel grava momento, kiam la popolanoj havos la ŝancon aktive partopreni en la dinamiko de la nacio — precize nun mankas klarvido kaj sereneco.

En tia situacio, en tia historia momento, kion devas pensi spiritistoj?


En *La Libro de la Spiritoj* troviĝas ĉapitro pri la progreso de civilizacio kaj pri la homaj leĝoj. Ili estas gravaj,

kvankam ne perfektaj. Ili estas tiaj, kiaj la homaro povis ilin fari, laŭ sia grado de evoluo. Alivorte, ni havas la leĝojn, kiujn ni “meritas”. Se ni volas plibonigi nian socion, tion ni faru ne per disputoj kaj kvereloj, sed per paca laboro. Se ĉiu civitano konsciencie kaj honeste plenumus siajn devojn de civitano, kaj uzus siajn parolojn por sincera kaj respektema dialogo, tiam nia socio pliboniĝus, eĉ se malrapide. Kaj fakte, malgraŭ la tertremoj, okaze de politikaj balotoj, nia socio evoluas. Komparu nian hodiaŭan situacion kun la Brazilo de antaŭ cent jaroj, ekzemple.

Jen la demando 573 en *La Libro de la Spiritoj*: “En kio konsistas la misio de la enkarniĝintaj Spiritoj?” Jen la unua frazo de la respondo: “En tio, ke ili instruu, helpu la progresadon, plibonigu la homajn instituciojn, per rektaj kaj materialaj rimedoj (...).”

Al spiritistoj do la Spiritoj rekomendas, en ĉiu momento de malstabileco, en individua kaj en la socia kampoj, ke ili klopodu vesti siajn sentojn kaj parolojn per amo, kaj ke ili eduku sin kiel eble plej profunde, por saĝe kompreni la ŝajnajn paradoksojn de nia malrapide evoluanta socio.

Cetere, en *La Evangelio laŭ Spiritismo*, plej forta konsilo estas: “*Spiritistoj! amu, jen la unua admono; instruu vin, jen la dua.*”





FORVIŜU VIAJN LARMOJN

KVANKAM SUFERANTE, batalante, plorante, marŝu antaŭen, sur via vojo, frateca animo.

Al vi ne mankos la rimedoj necesaj por la taskoj, kiujn vi akceptis kiel pordojn malfermitajn al via elaĉetanta tagbatalo.

La problemoj, kiuj en la pasinteco minacis vian animan pacon, estis solvitaj, kaj pro tio, la nuntempaj devas trovi vin pli fortigita, ĉar via fido estas pli firma.

Ŝanĝiĝoj ĉiam estas pozitivaj signoj sur la vojo de la evoluo. Se ili ne estus tiaj, la Tero ne moviĝus, okazigante la ŝanĝiĝon de la sezonoj, por doni al la homaro la diversecon de la klimatoj, kiuj pliriĉigas la homan vivon; la nokto ne venus post la tago; ne estus aŭroro nek sunsubiro; la semo ne fariĝus floro, kaj la floro ne fariĝus frukto.

La horo, kiun vi hodiaŭ vivas, ne estas tiu sama, kiun vi vivis hieraŭ, kaj ankaŭ ne estus tiu, kiun vi vivos morgaŭ.

Nu, akceptu la ŝanĝiĝojn, kiuj diferencigas vian hodiaŭan tagon de la hieraŭa, kiu jam forpasis...

Atente observu la cirkonstancojn, kiuj sin prezentas al vi, jen kiel lecionoj, jen kiel avertoj, jen donante al vi neatenditajn ĝojojn, jen invitante vin al pli gravaj meditadojn.

Ĉirkaŭiru la obstaklojn kun la firmeco, kiun la scio oferas al vi kaj iru firme, vin apogante sur ĉio, je kio vi jam kredas.

Ni estos apud vi en la momentoj en kiuj vi preĝos kaj ĉiufoje, kiam viaj manoj moviĝos por fari la Bonon.

Laŭ la leĝoj de la Dia Justico vi ricevos laŭ viaj donacoj; kaj laŭ la Mizerikorda Leĝo, al vi oni oferos okazon por ke vi, ilin profitante, ilin meritos plu kaj plu.

Forviŝu vian kaŝitan larmon, levu vian kapon kaj iru antaŭen!

La Sinjoro estos kun vi hodiaŭ, same kiel hieraŭ kaj morgaŭ, kaj kiel ĉiam!

Spirito: Icléia

Mediumo: Brunilde Mendes do Espírito Santo

Libro: *La vojoj de la paco*

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

BESTOJ KAJ HOMOJ

Aymoré Vaz Pinto



BESTOJ KONATAJ per sia sovaĝeco, submetitaj al edukado, sukcesis disvolvi amikecon kun la homoj, respektante la vivon kaj la integrecon de iliaj homaj amikoj kaj eĉ elmontrante ĝojon dum iliaj renkontoj.

Iu fojo mi marŝadis nokte sur dezerta kampara vojo kaj subite mi aŭdis bruon proksime kie mi devigas trapasi. Mi ektimis. Mia koro akcelis. Sekve mi konstatis ke temas pri ĉevalo kiu pastigis. Konstatinte ke temas pri besto, mi trankviliĝis.

Tiel mi pripensis: Mi estas pli trankvila renkonti bestojn ol renkonti homojn en dezerta vojo, pro tio ke ankoraŭ estas homoj sovaĝaj kiuj praktikas malbonajn agojn kaj vundas siajn proprajn similulojn. Se feroca besto kiel leono kaj uncio povas esti edukitaj kaj vivi pace kun la homoj, do, ankaŭ la homoj, se edukitaj, sukcesos vivi pace inter si.

Post tiu pripensado mi rememoris Zamenhof, kiu diris: "... iam la homoj komprenos unu la alian kaj vivos frate en ĉiuj lokoj en la mondo." (Zamenhof – Iniciador de l' Esperanto, A. Lopes Luna. Ediciones Vertiente, Buenos Aires, Argentino, pĝ 176.



| KOMUNIKOJ | Jaro 46-a

| n-ro 186 | Aprilo-Majo-Junio | 2022

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

Fondita la 15-an de Decembro 1975

Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz

23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)

+55-21-98427-8080

Librovendejo: editoralorenz.com.br

Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br

Fejsbuko: Editora Lorenz

| Kompostita de Rogério Mota |



Zamenhof

Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

Al Majnov, 25. V. (6. VL.) 1891 (o.v. V-96)

Tre estimata amiko!

Mi turnas min al vi kun unu peto kaj mi esperas ke vi ĝin ne rifuzos al mi:

Ingeniero V. Brzozowski havis publikan paroladon pri nia afero en la Societo Muzika en Murom, kaj nun li volas presi tiun ĉi paroladon kaj dissendi ĝin al la gazetoj. Sed en la lasta jaro la provincaj cenzuraj komitatoj tralastas nenion tuŝantan la lingvon tutmondan kaj postulas ke ĉio estu sendata al la cenzura komitato en S. Peterburgo. Tial mi nun sendas la manuskripton al vi kaj mi petas vin, ke vi ĝin prezentu al via cenzura komitato kaj kiam la komitato ĝin subskribos, mi petas tuj resendi la manuskripton al mi. Tiam vi skribos al mi ankaŭ kiom da mono vi elspezis por tio ĉi (ekzemple stampa marko por la cenzuro, kosto de la resendo) kaj mi kun danko ĝin resendos al vi.

P.S. Kio nova estas ĉe vi? Ĉu vi jam vendis la librojn, kiujn vi venigis de mi en la jaroj 1889 kaj 1890? Ĉu la Granda Princo havas la tradukon de lia verko?

Mi esperas, ke vi plenumos mian peton kiel eble plej baldaŭ.

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989).

VIVIGA ENERGIO

Antonio Felix da Silva



KIO REGAS en la vivo estas la volforto kun kiu ni, enkarniĝintaj Spiritoj, reagas al la obstakloj, kiujn la vivo proponas. En ĉiu momento, kiun ni vivas, kreiĝas speco de energikampo kapabla artiki ĉiun etapon de la sekva progreso en kapturna sinsekvo de ago kaj reago.

Tial gravas scii, tio estas, konscii pri tiu ĉi procezo, por ke ni ne perdu altvalorajn momentojn de nia vivo en etapoj de tuta fizika kaj/aŭ spirita senmoveco, ĉar la Spirito neniam estas neaktiva aŭ inerta, ĉar ĝi sendube reprezentas la vivantan forton kreitan de Dio.

Tiamaniere, la laboro, kiu estas farata, la agoj en ĉiuj kampoj de homa agado, estas la esenca nutrado por novaj kaj kreaj atingoj. Koni la ĝustan tempon por agi aŭ la ĝustan agadkampon por mildigi la angoron de realigo de la Spirito estas tio, kio respondas al esti feliĉa, ĉar ĉiu produktiva realigo alportas feliĉon al tiuj, kiuj ĝin plenumas, en speco de kompenso aŭ energia interŝanĝo, ĉar kiam oni liberigas energion por ago, spaco estas malfermita por novaj energiojn, kiujn ni iel povas nomi renovigo aŭ kresko.

Tre grave estas konscii pri niaj potencialoj, kiuj laŭ la naturo estas senlimaj, sed limigitaj sur la Tero, pro ties materia atmosfero.

Fari kaj refari ĉi tiujn realigojn denove kaj denove tenas la Animon aktiva, kreiva, lernanta kaj amasiganta spertojn, kio estas la kialo de nia surtera vivo. Voli esti aŭ plenumi, koncernas decidan etapon, kiu konkretiĝas kun volo plus ago. Ĉi tiuj du elementoj reprezentas la plej belan aferon pri la evolua procezo. Ili estas la leviloj, kiuj liberigas la Spiriton el stagno, malsano kaj doloro.



FEKUNDAJ SEMOJ

“Tenu brulanta antaŭ vi la lampon de Karitato kaj de pardono”.

“... faru, ke ĝi disverŝu kareson sur vian proksimulon.” Tiam vi vidos, ke la Printempo eterne superregos en via Animo — ia Luma Printempo, kiu daŭros plu en vi kiel ia beno de Dio!”

KARITATO KAJ PARDONO, DIA KAJ LUMA BENO DE LA HOMOJ

KARAJ FRATOJ, Karitato estas la plej parfuma floro, kiu ekzistas en la Universo. Ĝi estas la floro, kiu ornamas tiun, kiu portas ĝin kune kun si, kaj kiu ebrigas tiun, kiu sentas ĝian aromon.

Ĉie ajn vi povos semi ĝin, ĉar ĉie ajn ĝi ĝermos, parfumos kaj disigos siajn foliojn sur ĉian afliktitan koron.

Karitato estas la plej delikata floro en la ĉieloĝardeno, ĉar Karitato estas Jesuo, la Plej Amata de Dio.

Se vi volas vivi, lernu ami, ĉar Amo estas la patro de ĉiuj Virtoj. Kiu amas, tiu sentas en sia Spirito la parfuman elspiraĵon de Dio, ĉar Dio estas plena Amo.

La pardono, farita al povra pekinto, similas la roson, kiam ĝi malvarmigas unu floron.

La lipa pardono estas ia floro, kiun la vento disportas, sed la kora pardono estas tiu pardono, kiu purigas, same kiel la akvoj de la rivero Jordano.

Amikoj, vi kutime diras: “Se mi amas, tamen mi nur trovas maldankemojn; se mi disigas la Bonon, mi trovas nur malbonaĵojn faritajn kontraŭ mi; se mi disdonas lumon, mi nur renkontas tiujn, kiuj volas ĵeti min en la dubo-tenebrojn”.

Ne diru tion, karaj amikoj!

Kiu amas, tiu jam estas la plej amata de Dio, kaj poste estos la amata de la homoj, ĉar iam ili vidos, ke la peceto de Amo, kiun vi donis al ili, estis sufiĉa por malfermi en viaj koroj etan breĉon, tra kiu eniris la amo al Dio.



Se vi dissemos la Bonon, vi estos la elektitoj de la Sinjoro. Kion plu vi volas?

Kiu disdonas la miraklan akvon de la Bono tra la vasta vivo-dezerto, tiu iam vidos ĝin ŝanĝitan en vastan ĝardenon plenan de floroj, kiel frukton de sia klopodo kaj bonvolemo.

Kiu dissendas la lumon, tiu ricevos de Dio ian lumotorĉon. Kiu posedos ĝin, tiu ĉiam penadu, ke ĝi neniam estingiĝu, por tiel prilumadi tiujn, kiuj troviĝas en mallumo, kaj prilumu ankaŭ tiun, kiu troviĝas en dubo.

Klopodu, ke la vento de malpaco ne estingu tiun dian lumon, ĉar tiu vento estas tre fortika.

Klopodu teni vin en la Templo de la Di-Fido, por ke tiu vento ne atingu vin, kaj por ke vi povu, el la supro de tiu Templo, lumini, kvazaŭ ia lumturo, ĉiujn homojn, kaj konduki al la savo-haveno ĉiujn ŝipojn, navigantajn tra la ŝtorma maro de la vivo.

Faru la bonon, dissemu la Lumon kaj la Amon, por ke vi havu super vi la Dian Benon; la Benon de Dio.

Decembro 1938

Spirito: Icléia
Mediumo: Brunilde do Espírito Santo
El la libro: *Fekundaj Semoj*
El la portugala tradukis: Benedicto Silva



NI INTERĜANGU KULTURON PER LIBROJ!

VI, KIU ŜATAS LEGI, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estos granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj kaj ilin diskonigi inter niaj membroj!



Belaĵoj el mia Ĝardeno

JEN NOVA RUBRIKO de nia bulteno: “Belaĵoj el mia ĝardeno. La ĉifoj kunlaborantino estas **BENTINA ALVES**, loĝanta en la urbo Araruama, Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo.

Se vi, karaj geamikoj, amas la naturon kaj zorgas pri ĝi, sendu al ni mirindaĵojn el via ĝardeno aŭ ŭrbo. Kun granda ĝojo ni ilin aperigos en nia bulteno.



AMIKOJ DE LORENZ

Darci Gomes Sardinha



DARCI GOMES SARDINHA, aktiva esperantisto kaj spiritisto, naskiĝis en la urbo Carolina, subŝtato Maranhão (Maranjano), la 04an de aprilo 1951.

Li estas emerita ŝtata instruisto pri Teatra Arto. Darci esperantistiĝis en 2006, kiam li faris bazan kurson gviditan de Carlos Maria, ĉe Taguatinga Esperanto-Klubo. Li kaj lia edzino, Maria Terezinha de Carvalho Sardinha, instruas Esperanton en Spiritisma Societo Allan Kardec, ekde 2007. Tiu spiritisma organizaĵo situas en la urbo Brazlândia, Federala Distrikto.

En Spiritisma Societo Allan Kardec, Darci kaj Maria Terezinha okazigis ses seminariojn pri Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto.

Darci kaj Maria Terezinha kutime gastigas hejme eksterlandajn esperantistojn. Ili jam partoprenis plurajn naciajn kaj internaciajn E-aranĝojn. Darci estis kasisto de Brazila Esperanto-Ligo kaj nuntempe li estas membro de la Kontrola Komitato de Taguatinga Esperanto-Klubo kaj de Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj.

Darci Gomes Sardinha estas gaja, afabla kaj helpema homo, kiu tre ŝatas rakonti anekdotojn.

Kunlaboris: Eurípedes Alves Barbosa



Darci kaj Maria Terezinha.



Darci, Maria kaj la belaĵoj de la ĝardeno, vera paradizo.



Alberto Couto Fernandes

ALBERTO COUTO FERNANDES naskiĝis la 23-an de oktobro 1871, en São Luiz, ŝtato Maranhão, kaj forpasis la 21-an de aprilo 1946, en la urbo Rio-de-Janeiro

Li estis homo modesta, simpla kaj treege sindoninta al Esperanto. Li estis diplomita pri inĝenierarto, en 1894, kaj laboris dum longa tempo kiel ĝenerala direktoro en telegrafa kompanio.

La historio de la Esperanto-movado estas ligita al la vivo de Couto Fernandes. Fakte, ekde ties unuaj momentoj li organizis la brazilan esperantistan movadon kaj daŭrigis sian taskon ĝis sia elkarniĝo. Li helpis la fondadon de "Brazila Klubo de Esperanto", en 1906. En 1910 li estis elektita kiel Prezidanto de la Brazila Esperanto-Ligo kaj majstre ĝin gvidis dum ĉirkaŭ 35 jaroj. Preskaŭ ĉiuj numeroj de la revuo **Brazila Esperantisto** estis organizitaj de li.

Li ĉiam sindoneme okazigis la brazilajn kongresojn de Esperanto, kaj li klopodis por ke Brazilo ĉiam havu reprezentantojn en internaciaj kongresoj. Li efektivigis mezajn kaj superajn E-kursojn per korespondado kaj ankaŭ E-kursojn por infanoj. Li tradukis kaj publikigis diversajn librojn, inkluzive **Elementan Gramatikon de Esperanto**, kaj, kune kun Hernani Mota Mendes, li verkis la **Curso de Esperanto em 20 Lições** (E-Kurso en 20 lecionoj) kaj la libron **Elementa Radikaro**.

Li ankaŭ verkis plurajn tekstojn, kiuj estis publikigitaj en broŝuroj, sen indiko de la aŭtoro aŭ de la tradukinto. La strato, en kiu li vivis ĝis la lasta tago de sia vivo, en la kvartalo Laranjeiras, en Rio-de-Janeiro, ricevis lian nomon.

Elportugaligis: Benedicto Silva

PRESKAŬ PARABOLO

JUNKO ESTAS FRAGILA planto, kiu kreskas ĉe la rando de marĉoj, kotejoj, riveretoj...

En iuj malprofundaj kaj trankvilaj riveretoj, de tempo al tempo, povas okazi fenomeno nomata "akvokapo", supermezura kvanto da akvo, kiu tie trapasas kaj estigas malfeliĉegon, preskaŭ ĉiam ĉar ĝi estas io neatendita aŭ nekutima aŭ malofta.

Laŭlonge de l' riveretoj kreskas ankaŭ branĉoplenaj arboj.

Kiam okazas akvokapo, ĉio kio ekzistas sur la bordoj de la rivereto estas tuŝita de la pligrandigita volumeno de l' akvoj, kurantaj kun multe pli granda rapideco ol kutime. Multaj el tiuj branĉoplenaj arboj rezistigas ĉi tiun forton, fleksiĝas, kurbiĝas, sed foje ili estas faligitaj.

Nilson Bulhões



La junko, pro sia fragileco, ne povas rezisti: ĝi kliniĝas antaŭ tiu neatendita fortfluado, kiu pasas super ĝi.

Kiam ĉio ĉesas kaj la trankvilo revenas al la rivereto kaj la detruado jam povas esti taksata, la rezulto vidiĝas: en la akvo, preskaŭ ĉiam tre malproksime de la loko, kie ĝiaj radikoj estis fiksitaj, estas unu el tiuj grandegaj arboj, jam en la procedo de perdo de vivoforto. La junko restas en la sama loko, kie ĝi estis antaŭ la tragedio: foriginte la pezon, kiu fleksis ĝin, ĝi reprenis ĝian starigitan pozicion, preta daŭrigi ĝian procedon de vivo kaj de produktado de aliaj vivoj. La impona arbo havis potencon; la fragila junko havis nur fortikan paciencon.

MALLONGA RESUMO DE LA MOVADO “AFIŜU POEMON SUR LA STRATON!”

Mangarićusnė Miskolezi Beatrix

LA TAGO DE LA HUNGARA POEZIO estas festata en Hungario la 11-an de aprilo, ĉiokaze ankaŭ vi aŝiŝu poemon sur la straton!

La “Aŝiŝu poemon sur la straton!” - movado estas mondklasa poezia ago en la tago de la hungara poezio, je naskiĝtago de sinjoro Attila József, la 11-an de aprilo.

En la lastaj jaroj, en pli ol 20 landoj de la mondo vivantaj hungaroj aŝiŝis, surgluis poemojn en centoj da lokoj, laŭleĝe sur aŝiŝkolonojn, sur trotuarojn, kaj sur ĉiujn aŝiŝeblajn surfacojn.

En la urbo Szeged la “Aŝiŝu poemon sur la straton!” - movado estas de jaroj tre populara, do ni daŭrigis la tradicion, kaj la Biblioteko “Somogyi” ankaŭ ĉijare memoris tiamaniere pri la tago de la hungara poezio. Ni bonvenigis tiujn, kiuj volas persone aŝiŝi en ĉiuj niaj bibliotekoj, sed tiuj, kiuj ne povis aperi persone, sendis sian plej ŝatatan poemon interrete, en Fejsbuko. En la jaro 2022 ni metis 475 poemon sur la muron de niaj bibliotekoj.

La aŝiŝo de la poezio estas nekutima festo, kiu kunigas nin. Ĉiuj partoprenantoj aldonas iom al la granda festo, oni vivu ie ajn en la mondo.

Mi kunsendas la poemon, kiun mi aŝiŝis sur la muron.

Sanon kaj pacon!

Estime elkore salutas Vin, S-ino Beatrix

József Attila: Tavasz Van! Gyönyörű!

Tavasz van, tavasz van, gyönyörű tavasz,
A vén Duna karcsú gőzösökre gondol,
Tavasz van! Hallod-e? Nézd, hogy karikázik
Mezei szagokkal a tavaszi szél.

Jaj, te, érzed-e? Szerető is kéne,
Friss, hóvirághúsú, kipirult suhanás.
Őzikém, mondanám, ölelj meg igazán!
Minden gyerek lelkes, jóízű kacagás!
Tavasz van, gyönyörű! Jót rikkant az ég!
Mit beszélsz? korai? Nem volt itt sose tél!
Pattantsd ki a szíved, elő a rügyekkel -
A mi tudónkból száll ki a tavaszi szél!

Attila József: Printempas! Belege!

Printempas, printempas, estas belege.
Danubo olda revas ŝipojn sveltajn,
printempas! Aŭdu! Vidu, kiel portas
odorojn kampajn pnmavera vento.

Ve, ĉu vi ne sentas? Mankas amatino,
galantvianda, freŝa, pretersusura.

Mi dirus: kisu min, kaprioletto!
Ĉiu knabo estas bongusta rido pura!

Printempas, belege! Ĉielo ŝrikas!
Ĉu frue? Neniam estis tie vintro!
Malfermu koron, elvolu burĝonojn -
flugas el niaj pulmoj printempa vento!

(Márton Fejes)

Jam estas tempo por realiĝi aŭ aliĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, Almanakon Lorenz, la trimonatan bultenon Komuniko

kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon:
editora_lorenz@uol.com.br

(021) 98427-8080

KOMUNIKO N-ro 186



IU KAZO DE ASTMO EN LA CENTRA HOSPITALO DE LA ARMEO (CHA)

João Silva dos Santos

ESTAS KAZOJ, okazintaj en hospitalaj deĵorejoj, kiujn mi neniam forgesis kaj kiujn mi ŝatas rememori.

Tiu, kiun mi hodiaŭ rakontas, okazis en la 8-a jardeko de la pasinta centjaro.

Tiam mi laboradis en la Urĝejo de la Centra Hospitalo de la Armeo, kiam matene eniris tien iu junulino, nomata M. G., ŝajne 20-jaraĝa, suferanta astmon, probable jam sub la efiko de tro uzo de medicinaĵoj.

Ŝia klinika farto estis danĝera, tamen, mi ne scias pro kio, kutime ni ne sendis tiajn pacientojn al la Centro de Intensa Flegado. Mia opinio, al tiaj pacientoj la sensacio de tuja morto estas konstanta pro la sufoko. Ŝi tamen ne prezentis cianozon.

(Estis ja domaĝe, por mi kaj por ŝi, ke tiam mi ankoraŭ ne sciis la Homeopation, kiu estus solvinta tiun problemon, sen la risko de toksikado!)

Mi aplikis subtenan terapion, senĉese nutrante ŝin per glikoza kaj fiziologia serumoj per la vejno kaj ankaŭ plibonigante la spiradon per la nebulado.

Tio okazis en la komenco de la jaro 1980, kaj tiam mi estis fininta la kurson de hipnoto (ia kuracado-rimedo, kiun mi lernis for de la fakultato.)

Ĉu estus alveninta la horo, kiam mi faru mian "fajrobapton", uzante la Hipnozon? Ĉu malgraŭ tiu tuta sufero ŝi sukcesus priatenti "miajn parolojn"? Ĉu ŝi sukcesus sekvi la procedon dum pliaj dek minutoj? Estis duboj kaj duboj. Kio okazus, se mi malsukcesus? (Ankaŭ la kuracisto malesperiĝas!)

Ekde ŝia alveno mi komencis bonan kuracisto-klientan interrilaton kun ŝi, por ke ŝi sin sentu sekura kaj konfidu, ke ŝi estos bone traktata.

Ankoraŭ matene mi diris al ŝi, ke, vespere, kiam la malsanula ĉambro estos pli kvietaj, mi turnos ŝian liton, por ke ŝia dorso sin turnu al la enireja-elireja pordo (por eviti scivolemajn rigardojn), kaj mi aplikos rimedon por ke ŝi resaniĝu.

En la difinita horo mi realigis la procedon, rigore (por ne fari erarajn) kaj sukcesis ŝin dormigi.

La dormo estas terapio. En tiu nokto, ĉe la spaco de 30-40 minutoj, mi kontrolis, ĉu ŝi ankoraŭ dormadis. La brua kaj malfacila spirado daŭris plu, sed tamen ŝi verŝajne profunde dormadis. Bonege!

En la sekvanta mateno mi vekis ŝin por ke ŝi prenu la matenan kafon kaj ankaŭ por la zorgoj de la flegado.

Antaŭ ol mi iri hejmen por ripozi post la 24-hora deĵorado, mi ordonis, ke oni ne veku ŝin.

Estus multe pli avantaĝe ke ŝi dormu ol perdi nur du manĝojn.

Mi iris hejmen kaj mi programis, ke ŝi dormos ĝis la sekvanta tago. Ŝajnas, ke ĉio okazis kiel planita!

Kiam mi alvenis en la sekvanta mateno, mi eksciis, ke iu monaĥino, aludinte al mi, diris al la flegistinoj, ke ŝi ne volis scii pri kuracisto, kiu interkonsentis kun la diablo!

Tiu monaĥino, ĉiam serioza kaj silentema, eraris pri mi kaj ankaŭ mi eraris pri ŝi, pro tio, ke mi ne serĉis ŝin por fari la necesajn klarigojn. Ni evitis unu la alian! (Kiom da malprofitoj kaŭzas la manko de klariga dialogo!)

Iom post iom la junulino plibone ekfartis, ni sukcesis multe malgrandigi la dozojn de la medikamentoj kaj ŝi havis forpermeson por reveni al sia loĝejo.

Mi sendis ŝin al medicina publika poŝto, en la kvartalo Méier, por ke tie ŝi submetiĝu al aliaj sesioj kaj estu orientita. De la poŝto ŝi estis sendita al iu ambulatorio, kie ŝi ricevos kuracistan flegadon.

Feliĉe, ĉio atingis sian celon kaj mi konsideris prospere atingita tiun mian unuan aplikadon de la hipnoto.

Tio ege kuraĝigis min iri antaŭen, dank' al Dio.

Miaj kolegoj en la Sesio de Premanta Situacio, la kuracistaj oficiroj R2, fariĝis tre kortuŝitaj.

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

HOMAJ INTERRILATOJ

1 LA SES PLEJ GRAVAJ VORTOJ:

Jes, mi konsentas, ke mi eraris...

2 LA KVIN PLEJ GRAVAJ VORTOJ:

Ja bonan laboron vi faris!

3 LA KVAR PLEJ GRAVAJ VORTOJ:

Kiu estas via opinio?

4 LA TRI PLEJ GRAVAJ VORTOJ:

Bonvolu, mi petas...

5 LA DU PLEJ GRAVAJ VORTOJ:

Mi dankas!

6 LA PLEJ GRAVA VORTO:

Ni.

7 LA MALPLEJ GRAVA VORTO:

Mi.

El la portugala esperantigis:
Elmir dos Santos Lima





AMARAJ MOMENTOJ

BATITA DE EKSTERORDINARA DOLORO, la homo inklinas al la frakaso per rezignado.

Rezistu!

Devigu la volon rezisti.

La manovro de la malklereco ĉirkaŭvolvas vin en tenebro-mantelojn.

Jen teruraj, timigaj imagoj de doloro kaj sufero...

Funebraj imagoj de kruela sufero ekposedas nian imagopovon!

Rezistu!

Levu la mentonon kaj forpelu el via frunto la nigrajn nubojn de la timo.

Ne permesu, ke la timo regu vin!

Instigu vian volon kaj konduku vian penson al aliaj direktoj.

Konduku vian menson al gresaj vojoj, prilumataj de la lumo filtrita tra la arboj. Estigu medion de trankvileco kaj kvieteco.

Rebatu la atakon de tiuj, kiuj prenas sur sin/al si la bestan aspekton kaj intencas nur timigi. De la malfeliĉuloj, kiuj sin prezentas sub masko, kaj kiuj, sub tia trompŝajno, ankoraŭ ŝajnas pli malfeliĉaj.

Imagu ilin, kiel iajn infanonjn grimacantajn.

La suno ĉion prilumas!

La muziko trairas la boskojn kaj la rojo donas al ĝi la susurantan ĝojon!

Forgesu tion, kio vin suferigas kaj igas vin farti balbone. Tenu ĝojon en via mieno kaj en via pensado.

Tiamaniere, restariĝintaj en la ekvilibro kaj fortigitaj de memfido, ni povos alfronti niajn proprajn fantomojn.

La tuta restaĵo estas nur iluzio.

Ĉio ajn estas iluzio.

Ĉio ajn teruriga estas mensogo.

Ni eltenu iom plu, penante atingi la supraĵon. Serĉu la puran kaj kvietan akvon, la malpezan kaj trankviligan zefiron.

La amo de Dio troviĝas en ĉio ajn.

Spirito: Francisko

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

Kunlaboris: João Marrara

STANISLAV SCHULHOF



Naskiĝis en 12 Nov 1864 en Lipka – Ĉeĥio kaj mortis en Pardubice. Li estis ĉeĥa esperantisto kaj dentkuracisto en Pardubice. Li estis entuziasma pioniro de la esperanto movado en Ĉeĥio. Estis ankaŭ poeto, ĵurnalisto, redaktisto. Lasis plurajn rakontojn kaj poemojn apreciatajn de la Esperanta Literaturo.

Kiam mi vidas

Kiam mi vidas kiel mokridas
La nekredantoj je la spiritoj,
Konsiderante ilin nur mitoj,
Kaj nur je l' karnaj ĝuoj konfidas:

Kiam mi vidas kiel insidas
Ilin de l' tentoj invitoj
Kaj de l' voluptaj bildoj incitoj
Tiel ke l' homoj peki decidias;

Kiam mi vidas tion, mi sentas
Grandan doloron, grandan kompaton,
Ĉar mia vido mensa prezentas

Tre malfeliĉan ag-rezultaton;
Ilin atendas justa sufero
Jam sur la tero, aŭ en l' etero.

Stanislav Schulhof

Mediumo: F. V. Lorenz

El la revuo "Reformador" (FEB), aŭg 1948, p. 170

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

SENPAĜAJ LIBROJ

Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de *Komunikoj* en la tuta mondo!

Se vi volos ricevi **NIAJN LIBROJN** kaj la jarlibron, **ALMANAKO LORENZ**, tute senpage, per la pdf-a aŭ papera versioj, sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso.

Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:

editora_lorenz@uol.com.br






NOVO DICCIONÁRIO PORTUGUÊS-ESPERANTO

de Allan Kardec Afonso Costa

Revisado e ampliado • 46 mil verbetes • 907 páginas
Capa dura • 27,5 x 20,5 cm

Adquira já em: editoralorenz.com.br

 (21) 98427-8080

[QR-code ao lado]

 **BRINDE ESPECIAL**



EDIÇÃO LIMITADA COM PREÇO PROMOCIONAL DE RELANÇAMENTO

TRAVIVU VIAN PACON

FRATECA ANIMO, travivu ĉi tiun momenton dediĉitan al via paco!

Identigu kun la bonfarantoj, kiuj el la Supera Mondo estigos al vi la subtilajn vibrojn de espero, de fido kaj de konfido je Dio.

Pentante, diru: estu kun mi, Sinjoro!

Kun pli trankvila koro, revidu la motivojn, kiuj kaŭzis al vi malĝojon kaj amaraĵojn.

Ekzameni ilin. Ĉu valoras la penon tiom multe suferi pro ili?

Ĉiu suferita doloro estas kvazaŭ ia lumo, kiun vi ekflamigas super viaj paŝoj.

Memoru viajn problemojn kaj diru al vi mem, ke ili estiĝis ne por vin frakase venki, sed por ke, apogita sur la dia mizerikordo, vi ilin venku!

Memoru tiujn, kiuj vin ofendis aŭ estis maljustaj al vi, kaj rigardu ilin kiel sincerajn fratojn, kreitajn de la sama Patro, kvankam ili ankoraŭ portas la “viruson” de malpieco.

Kompatu ilin! Ĉiam estas preferinde esti agresita ol agresi: suferi ol suferigi.

Danku Dion por via voĉo, kiu devas leviĝi nur por paroli pri pozitivaj faroj.

Estu danka al Dio por viaj perfektaj okuloj, kiuj devos sin fiksi nur sur la plej belaj aspektoj de la vivo.

Estu danka al Dio por viaj manoj, kiuj devos sin movi nur por la farado de bonaj verkoj.

Pro tio, forgesu ĉion, kio sin prezentos kiel io humiliga aŭ negativa.

Pro tio, forgesu tiujn, kiuj eraras, tiujn, kiuj persekutas...

Forgesu la malhonestajn, la malpiajn...

Forgesu la avarulojn, la ekspluatantojn...

Forgesu ilin!

Vi ne estos la juĝisto, kiu ilin kondamnos. Dio ilin vidas, kaj ili vivos!

Ne permesu, ke tio, kion ili diris aŭ faris, plenigu la templon de via menso!

Ne gardu forĵetaĵojn! Ornamu vian internan loĝejon per la floroj de espero kaj paco.

Vi mem povas konstrui vian feliĉon.

Firme ripetu: Mi kredas je Dio! Mi kredas je la potenco de la Bono, kaj pro tio mi estas feliĉa, kaj pro tio mi estas en paco!

Spirito: Icléa

Mediumo: Brunilde Mendes do Espírito Santo

Libro: *La vojoj de la paco*

Tradukis el la portugala: Benedicto Silva

